B.K. 2012-
Branĉo: Poezio
Jesper Jacobsen – Francio – honora mencio

Homsaĝo

La flirtjupa Primavero
trakuras la pejzaĝon.
Ŝiaj nudaj piedoj
movas la polvan teron
kaj transgazelas heĝojn
el pikdrato. Arda brizo
distendas ŝian gazan
ĉemizon malpudore.
Ĉe ŝia maldekstra mamo
suĉas avide knabo
helbrunvanga. Per rigardo
imperiestra ŝi tremigas
la daktilajn palmojn kaj
movas eĉ piramidojn.
Uvojn plensukajn ŝi ĵetas
per sia mano libera al
popoloj jam esperplenaj.
Vinon el amforo antikva
ŝi oferas al batallacaj
urborekonkerintoj.

Sed nun devias ŝi norden
kaj eniras tro venkebrie
zonon, kiu firmtenas
bankize ankoraŭ estro
kun koro el dirta glacio.
Ŝiajn piedojn liliajn ŝiras
la fridaj kristaloj surstrate
tie sirie. Rozon vivfinan
plantas snajpero meze
de la frunto knabeta.
Rigidiĝas lia rigardo
en gapon scivole miran.
Sed la larmojn patrinajn
superbruas la ŝrapneloj
kaj l'indiferenta silento de
ekrandistaj anonimuloj.